

La **50** JAROJ **Jubileo**  
HIZENBERG **XXIX UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

Varsovio, junio-julio 1937

Nr. 6 — 7.

ENHAVO:

De Redakcio.

Julio Baghy — Pacan Jubilean Kongreson!

Wilhelm Róbin — Ĉu prava pesimismo?


La Kristana Esperantista Ligo Internacia.

Programo de la Blindula Subkongreso.

Komunikoj de LKK.

Listo de kongresanoj.

Anoncoj.



Prof. d-ro Odo Bujwid.  
Prezidanto de Pollanda Esperanto-Delegitaro.  
Seniaca batalanto por nia ideo.

Fot. J. Sapiro



## KARAJ SAMIDEANOJ!

Post kelkaj tagoj Vi venos Varsovion por partopreni nian Jubilean Feston Esperantistan, la Universalan Kongreson. En tre malfavora tempo Ĝi okazas. Tial, ne dek miloj da esperantistoj, sed nur milo Ĝin partoprenos, nur elektitaj bonŝanceloj vizitos Varsovion, la urbon kie vivis, laboris kaj mortis nia neforgesebla Majstro, la Kreinto de Esperanto. Kaj al Vi, kies alvenon ni sopire atendas kaj kies plej amikan gastigon ni klopodas prepari, kaj al Vi ĉiuj, kiuj en la vasta mondo estas pense kun ni, fratajn kaj samideanajn salutojn sendas

Redakcio de „La Jubilea“.

## PACAN JUBILEAN KONGRESON!

Varsovio. Sufoke varma tago. La sunradioj orumas la laborĉambron. Skribmaŝinoj tamburas marŝmarŝon, kapoj kliniĝas super sliparojn, zorgemaj manoj pakas, adresas. Laboro, laboro, laboro. Ĉiutage tiel. Nur la noktomezo haltigas ĉi tiun aktivecon. Niaj polaj gesamideanoj fortoŝtreĉe preparas la renkonton al la „jubilea“ morgaŭo.

Nun ie fore ektonĉras malproksima fulmo. Nigra nubo aperas ĉe la horizonto minacante per tempesto. Neniu rimarkas ĝin. La laboro ne haltas. Nur miaj pensoj vagas for al la ekstera mondo. Tiu fora fulmotondro rememorigas min pri la Nuno.

Ankaŭ en la preme arda atmosfero de la ekstera mondo la homoj same luktas, batalas, laboras por gardi la ekvilibron de la ĉiutaga vivo, sekuri la pacan prosperon, prepari pli belan estontecon, tamen foraj tondroj avertas nin, ke potencaj fortoj aktiviĝas sub la tavolo de la videbla vivo. Bonvolo kaj malico luktas unu kontraŭ la alia. La internacia diplomatio dancante sur la vulkana tereno de la politiko ĵonglas per frazoj, faras korhaltigajn atrakciaĵojn por ekvilibri kaj konservi la pacon de la mondo. Ĉu la diplomatoj, sukcesos? Kiu scias? Ni esperu, ke en ilia agado estas pli da povo ol en tiu de la indigenaj magiistoj, kaj ke ilia kreaĵo ne pruviĝos nur lerta iluziaĵo. Ho, diplomatio de la mondo, aŭskultu la korbatojn de ĉiu popolo; ili malespere petegas: pacon, pacon, pacon!!!

Miaj pensoj rifuĝas de la ekstera ĥaoso al nia eta mondo: al la movado esperantista. Ĉi tiu kulturklopodo de centmiloj ĉiam formis azilon de tiuj animoj, kiuj kredas pri la homa boneco, pri la konkordigeblaj celdifinoj inter la diversaj nacioj kaj trovis ne sole konsolon, sed ankaŭ novan energifonton por realigo de tiuj noblaj aspiroj, kiuj nur utili povos por la homaro. Sed ve! Kion ni vidas? Antagonismoj, gvidprincipaj diferencoj kaj ĉefe personaj preferoj disŝiras la ĉenon de la unueco, kreas partiojn kaj ĉiu bonvolo por efektiviĝi la unuecon, por forigi la antagonismojn

montrigas vana, eĉ fariĝas elirpunkto de novaj, pli akraj kvereloj. Ho, diplomatoj de nia eta mondo, aŭskultu la korbatojn de la samideano; ili malespere krias: pacon, pacon, pacon!!!

Sed ĉu oni povas esperi nun? Objektive rigardante la aferojn mi devas konfesi, ke malmulte da ebleco ekzistas por efektiviĝo de jenaj deziroj: unueca laborsistemo, lojala respekto al vidpunktoj ĉiversaj, cedemo al la plimulto. Nur unu oni povas atingi per festrespekta konsento: jubilean armisticon.

Jen por kio la varsoviaj gesamideanoj sinofere laboras. Bone komprenu! Ili preparas Jubilean Kongreson kaj ne kongreson de IEL, nek tiun de UEA kaj eventuale tiun de iu nekonata tria organizaĵo. Ili laboras por demonstracia festeno de la esperantistaro, por nobla armistico, dum kiu la reciprokaj bombardado kaj akuzoj devos silenti. Tiu ĉi jubileo montru modelon al la ekstera mondo pri harmonio diversnacia. Niaj generaloj neniam faris pli utilan manovron ol se ili respektos tiun intencon kaj akcelos ties sukceson. Kiu eksplodigos la festrompantan petardon, tiu certe perdos la simpatian eĉ de siaj adeptoj.

La sukceso de la plej genie kreita plano dependas ne nur de la gvidantoj, sed ankaŭ de la sinteno de la adeptoj. Por havi efektive harmoniplenan jubileon vi ĉiuj forgesu hejme viajn skrupulojn pri la estonteco, lasu flanken antagonismon, personan kaj gvidprincipajn argumentojn, ne kunportu eĉ bonvolajn pacigajn proponojn, sed provizu vin abunde per unu sento: per la pio de pilgrimanto al la loko, kie vivis, laboris kaj mortis tiu homo, kies genio donacis novan kulturfaktoron al la socia vivo de la homaro. La rememoroj pri la komenco superomburu vin, lia sinofera persistemo inspiru vin, la lojale harmonia kunlaboro de la unuaj pioniroj aperu al vi kaj vi ĉiuj, kiuj estos alvenintaj, klopodu krei la atmosferon de la unua kongreso okaze de la duoncentjara jubileo de nia komuna lingvo. KREDU kaj estu konvinkitaj, ke tiu ĉi armistica silento balzamos la vundojn, la revelacianta bon-



volo cikatrigos la verajn aŭ imagitajn fendojn kaj konvinkos ne nur vin, la adepton esperperdintan, sed ankaŭ la mondon eksteran, ke nia movado povos ne nur promesi, sed efektive doni tiun atmosferon, en kiu la paca kunlaboro ebligas.

En tiu ĉi momento kvazaŭ mi vidas ironian rideton ĉe la buŝanguloj de kelkaj skeptikuloj. Tiu rideto mokas min: „Ho, naiva poeto, nur via fantazio povas imagi tian eblecon. Ĉu iam vi aŭdis, vidis, ke armiloj silentiĝis dum furiozo de batalo kaj la pacemo de la Homo revelaciis, kiam du malamikaj partioj staris unu kontraŭ la alia?

Ho, jes! Unu el miaj amikoj rakontis: „okazis dum la milito, ĉe la serba — hungara fronto, ke la batalbruo subite haltis eĉ sen antaŭa konsento. La du tranĉeoj etendiĝis en kelkcentpaŝa distanco. Maŝinpafiloj tiktakadis, kanonoj vomis grenadojn dum la tuta tago. Subite el la apuda arbaro aperis apenaŭ dujara infano. Sentime li paŝetadis sur la batalkampo kaj ne konsciis pri la danĝero, per kiu la mortvokaj kugloj minacis lian junan vivon. Infano, forgesita aŭ jam orfa, de iu arbarloĝanto, promene aŭ serĉe vagadis inter la tranĉeoj, kie la antaŭan tagon regis la paco de la naturo. Kaj mirakle, kvazaŭ konsente, la armiloj eksilentis en la tranĉeoj. La Homo venkis la bestan furiozon kaj en tiu kvaronhora armistico nevidebla mano karesis la koron de la batalantoj“.

Kaj mi mem vidis ĉe la rusa — hungara fronto en la Karpatoj, kiel ideorespekto ĉesigis militan sovaĝecon. Estis tago de Kristnasko. Neatendite aperis blanka flageto ĉe la rusa tranĉejo. Ni pensis pri kapitulaco. Ne estis tiel. La rusaj soldatoj, portantaj modestan regalajon en la mezon de la intertranĉea tereno, deklaris, ke ili proponas kvarhoran armisticon al la malamiko, ke ĝi



Varsovio. Str. Marszałkowska

Fot. H. Poddebski.

povu almenaŭ rememori feste kaj trankvile pri la kristnaska datreveno. Nu, tiu kvarhora mutiĝo de la armiloj elokvente pruvas, ke la Homo povas leviĝi ĝis alto de nobleco eĉ dum batalo, se li malfermas sian koron al la respekto de idealoj kaj al estimo de grandioza ideo.

Karaj gesamideanoj, pensu pri tio, ke dum nia Jubilea Kongreso la ĝistombe infana animo de nia Majstro aperas inter ni por retrovi sian kampon, kie la paca atmosfero certigas la sukceson de lia postlasita verko. Alportu do nur vian samideanan koron. Nenion pli! Estu konvinkita, ke tiam nia Jubilea Kongreso havos grandiozan efikon moralan por postaj laboroj kaj ĝi donacos neforviŝeblan belan memoron tiel al gvidantoj, kiel al simplaj adeptoj. Ni montru nin indaj posteuloj de tiuj veteranoj, kies paca laboro faris vivantan realaĵon el Esperanto.

Pacon! Pacon! Pacon!

Julio Baghy.

## ĈU PRAVA PESIMISMO?

(Antaŭ la Varsovia Jubilea Kongreso).

En la nuna momento de interna organiza malpaco kaj eksteraj ekonomiaj malhelpoj, komecas regi pesimismo pri nia estonteco. Ĉu valoras propagandi plu nian movadon? Ĉu valoras veni Varsovion?

Permesu, ke mi rakontu al Vi 3 faktojn el mia esperanta vivo.

Jaro 1904. Jus eksplodis rusa — japana milito. Mi estis afable devigita veturi, kiel militkuracisto, en urbon Ĥabarovsk, ĉe rivero Amur en Malproksima Oriento. Mi sidis en la vagonaro 21 tagnoktojn ĝis la celo de la vojaĝo. Tra Siberio, Manĝurio, Amurlando. Miaj najbaroj estis la fama Saĥalin, kien la rusa registaro forpeladis krimulojn kaj la Granda Oceano.

Mi ne estis ravita de mia sorto. Kolegojn — kuracistojn oni dissendis diversflanken: en regimentojn, sur ŝipojn ktp.

Subite mi eksciis, ke en tiu malproksima ur-

bo ekzistas vigla, entuziasma Esper. Societo. Baldaŭ la Societo eksciis, ke alvenis el Eŭropo homo, kiu parolas efektive Esperanton.

La sekvantan tagon vizitis min Samideano Kapitano Tenisov el la Rusa Armeo, Sekretario de la nomita Societo. Li kortuŝe min salutis. Ni baldaŭ amikiĝis. La Societo konsistis el tieaj eminentuloj. Regulaj jaŭdaj vesperoj kun ekzercado, babilado. Rezulto: mi pasigis la tutan militon en la urbo Ĥabarovsk, kredeble dank' al penadoj de miaj esp. amikoj.

2) Dum la granda eŭropa milito mi perdis la kontakton kun miaj parencoj, kiuj restis en Polujo, okupita de Germanoj. Dank' al UEA mi kelkfoje ricevis precizajn informojn pri ili. Komprenos tion nur homo, kiu travivis pezajn monatojn sen sciigoj pri la sorto de siaj proksimuloj.

3) Jaro 1915. La sama granda milito. Mi ree, kiel militkuracisto, laboris en urbeto Deblin. Mi loĝis en izolita dometo, sen ia ajn meblaĵo.



La logantaro tute forlasis la urbeton. Ni mangis ĉian fiaĵon. Mi baldaŭ ekmalsanis je apendicito. Resti en mia kabano mi ne povis. Miaj kolegoj — militistoj ne rajtis transporti min en hospitalon, plenplenan de vunditoj. Kion fari?

En tiu grava momento Esperanto min savis. Mi turnis min al Samideano Dro Sochacki, fervoja kuracisto, kiu sukcesis ricevi permeson por lokigi min en bona hospitalo.

Jen 3 faktoj por skeptikuloj. Por skeptikuloj, kiuj ĉiam atendas... Por homoj, kiujn ne allogas nia „interna ideo“, la efektiva motoro de niaj agoj, sed la praktika flanko.

Ĉiu el ni travivis similajn agrablajn momentojn. Kaj tial nia ideo metis profundajn radikojn en niaj koroj, tial ne ekzistas jam forto, kiu povos detruji nian fidon kaj nian kredon.

Jes, nia movado, kiel ĉiu serioza movado, de tempo al tempo deflankigas, — ne unufoje aperados ankoraŭ misuzoj, miskomprenoj, atakoj. Tio estas normala sorto de ĉiu ideo. Tiaj ŝanceladoj devas ekzisti. La mondo konsistas do el 5% da homoj pensemaj kaj 95% da indiferentuloj aŭ malamikoj de ĉiu ideo progresema.

Ni iros trankvile nian vojon. Ni are alvenos Varsovion. Ni ne sole solvos tie la malagrablajn organizajn demandojn, sed preparolos denove seriozajn metodojn por forta, harmonia, konkorda kaj definitiva atako de indiferentuloj kaj nekredemuloj.

Kune kaj obstine al la celo! Ĝis revido en Varsovio!

Dro Wilhelm Róbin.

## EL LA PASINTAJ JAROJ...



Kunveno de Varsovia Urba grupo de Pollanda Esperantista Junulara Ligo en 1907 jaro — kun nuna generalo Tadeo Kasprzycki, ministro de militaj aferoj.

De maldekstre: 4a en lasta vico—gen. Kasprzycki, 3a en lasta vico—kolonelo W. Ludwig, 5a — june mortinta poeto Stanisław Kruszewski, redaktoro de la „Junularo“, la en unua vico de starantoj — Kazimierz Rybczyński, aŭtoro de la lernolibro „Ruĝa broŝuro“, 9a en la sama vico—ing. Wł. Sikorski, 4a en la vico de sidantoj — d-ro Jan Mędrkiewicz.



# LA KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA (K. E. L. I.)

Ĉar K. E. L. I. aranĝos fakkunsidon en la kadro de la Jubilea Kongreso, niaj legantoj certe interese akceptos kelkajn klarigojn pri ĉi tiu kampo de la Esperanto-movado.

K. E. L. I. oni devas envicigi en la Esperanto movadojn inter protestantoj kaj inter protestantaj organizaĵoj aŭ misioj.

La ligo en principo fondiĝis post trijaraj interrilatoj de protestantaj interesuloj dum la 7a Universala Kongreso de Esperanto 1911 en Antverpeno. En la jaro 1913 la organiz-laboro finiĝis.

Pro tio ĝi en la pasinta jaro jam festis sian 25 jaran jubileon.

K. E. L. I. ne estas bazita sur iu religia aŭ eklezia dogmo, kiu estas starigita de homo, sed rekte sur la ĉefa fundamento de la kristanismo, sur la faktoj de la biblia evangelio.

Do en ĉi tiu ligo kore estas bonvenata ĉiu homo, tute egale, sur kiu dogmo li estas baptita, kiam li plene akceptas ĉi tiun evangelion kiel montrilon aŭ direktilon por sia kredo kaj agado.

Malgraŭ la longjara ekzistado la anaro de la ligo estas malgranda, sed ĝi konsistas prefere el fidelaj kaj fervoraj sekvantoj de kristanismo kaj esperantismo. Pro tio la movado estas bone bazita kaj preparita por eventuala subita etendiĝo de la E. — movado en la kampo de la kristana, kaj speciale de la protestanta misio.

Laŭ la lasta jarraporto K. E. L. I. estas reprezentata en 18 landoj. Oni kalkulis entute 460 anojn. Plej forta estas la movado en Nederlando. En lasta tempo ĝi treege kreskas en Svedujo. Nova vivo montriĝas en Francujo kaj en Japanujo. Anglujo jam de la komenco tre bone kunlaboris. En Germanujo dum la nunaj cirkonstancoj anoj ne povas esti kalkulataj. Tamen ĉiuj restis fidelaj al la movado, kuraĝigas eksterlandajn geamikojn per daŭra korespondado kaj per monsubtenoj por la laboro de la ligo.



Pieniny. La rivero „Dunajec“.

Fot. H. Poddebski.

La oficiala organo de la ligo estas „Dia Regno“, kiu aperas ĉiumonate krom la kongresa monato. Ĝi estas redaktata de la prezidanto s-ro. Paul Hübner (Germ.) kaj la nederlandaj estraranoj, s-roj. — H. C. van Leeuwen kaj L. Woudenberg. Kasisto estas s-ro. L. Woudenberg, Hildengondestraat 25, Bussum, Nederlando. Li akceptas kotizojn kaj aliĝojn. Ĝeneralajn informojn donas s-ro. P. Hübner, Gladbacherstrasse 1095, Köln-Dellbrück, Germanujo.

Per helpo kaj instigo de la ligo unue aperis en la jaro 1912 la Nova Testamento en Esperanto, kiu povis esti kunigata kun la preta Malnova Testamento en la jaro 1926, kiam aperis la tuta Biblio en Esperanto. Intertempe aperis jam tre bela esperanta literaturo, kiun eldonis la protestanta esperanta movado.

H.

## ANTAŬKONGRESO EN PRAHA.

5—6 Aŭgusto 1937.

Prepara komitato ĵus konstituiĝis kaj invitas la samideanojn viziti la 5-an kaj 6-an de aŭgusto la ĉefurbon de Ĉeĥoslovaka respubliko. Rabato fervoja. Faciligoj loĝejaj. Senpaga vizito al multaj famkonataj vidindaĵoj de Praha. Gaja vesperarango. Aligintoj ricevos bele ilustritan broŝuron pri Ĉeĥoslovakio (senpage). Neniu speciala kotizo. Simpla anonco sufiĉas. Sola peto: informu pri via aliĝo sufiĉe frue. Detalaj informoj ce la Prepara Komitato Fr. Slavík Praha XIX Uralské 9.

### Programo:

**Ĵaŭde 5.VIII.:** akcepto de la gastoj tuj en la stacidomo. (Anoncu la horon de via alveno)!

**Vizito de la vidindaĵoj de Praha.** Amika vesper-arango kun iom da programo.

**Vendrede 6.VIII.:** Kunveno por honori la 50 jaran jubileon de Esperanto. — Vizito al la urbdomo. — Akcepto de la urbestro de Praha. — Tagmanĝo. — Posttagmeze dua vizito tra la urbo.

**Vespere forveturo** je la 23.03 al Varsovio (alveno tien sabate je la 12.48 horo).

Neniu speciala kotizo. — Fervoja rabato por kongresanoj. — Necesas sole: Informi pri la horo de via alveno kaj pri la ĉambro dezirata (unulita jam por 5 sv. fr., dulita 10 sv. fr.).

Senpagajn esp. broŝurojn pri Ĉeĥoslovakio kaj ĉiujn detalajn informojn sendas

Prepara Komitato  
PRAHA 47  
Uralské 9.



## PROGRAMO DE LA BLINDULA SUBKONGRESO



Stata Blindul-Instituto en Varsovio, kie okazos la XIV Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Sabato 7. VIII. 1937.

19. h. Interkonatiĝa vespero en la Stata Blindulejo.

Dimanĉo 8.

9. h. Diservo

12. h. Solena malfermo de ĉefkongreso.

17. h. Solena malfermo de la blindula subkongreso.

20. h. Festo de Veteranaj.

Lundo 9.

10. h. Ĉe la tomboj de l'. Majstro kaj Grabowski.

15—18 h. Laborkunsido.

20 h. Teatro.

Mardo 10.

9—12 h. Laborkunsidoj.

15. h. Malfermo de fakaj ekspozicioj.

16—18. h. Laborkunsidoj.

21. h. Internacia Vesperto de Blindaj Artistoj.

Merkredo 11. Pilgrimo al Białystok.

Jaŭdo 12. 9—12 h. Laborkunsidoj.

14—19. h. Ekskurso al la Blindulejo Laski ĉe Varsovio.

20. h. Kabaredo.

Vendredo 13. 9—12 h. Laborkunsidoj.

15—18. h. Ekskurso tra la Varsoviaj blindulejoj.

20. h. Bankedo kaj danca vespero.

Sabato 14.

10 h. Ferma kunsido de la ĉefkongreso.

15. h. Ferma kunsido de la blindula subkongreso.

La blindula kongresejo troviĝos en la Stata Instituto por Surd - Mutuloj kaj Blinduloj, Warszawa, Plac 3 Krzyży 4. Ĝi troviĝas en granda ĝardeno, meze en la urbego, proksime al ĉiuj ejoj de la ĉefkongreso. Loĝado en la instituto estas tute senpaga. Laŭvole oni povos rezervadi dultajn ĉambrojn kun plena komforto en hotelo, en la senpera proksimeco de la kongresejo po zł. 3.— (tri) por tago kaj persono.

Mangoj okazos trifoje po tago: je la 8; je la 13 kaj 19. h. Po zł. 2.— (du) por tago kaj persono, pagendaj antaŭe por la tuta semajno.

Blinduloj kaj akompanantoj ricevas individualan 50% (kvindek) rabaton sur la polaj fervojoj.

## PILGRIMO AL BIALYSTOK

Interkonsente kun la urbestro de Białystok estas starigita jena provizora programo de la pilgrimo al Białystok la 11-an de Aŭgusto nj:

10-a horo matene. Alveno Białystokon per speciala vagonaro. Salutparoladoj de la reprezentantoj de la ŝtato kaj urbo.

Komuna forveturo de la stacidomo en la urbon. 10,30—11,30. Komuna matenmango (partoprenkosto proksimume 1 zloto).

11,30—14,30. Vizito al Zamenhofa naskodomo. Enskribiĝo en la Ora Libro. Komuna fotografa-

do antaŭ Zamenhofa naskodomo. Poste vizitoj al Palaco de Branicki kaj rondirado tra la urbo.

15—16 h. Komuna tagmango (partoprenkosto — ĉ. 1 zl. 50 gr.).

16—18 h. Esperanta propaganda solenaĵo en la belaj aleoj de la vojevodo Kościałkowski. Paroladoj, disaŭdigataj per megafona stacio. Parolos reprezentantoj de lokaj aŭtoritatoj kaj ankaŭ reprezentantoj de landaj kaj fakaj asocioj Esperantistaj, (ĉiu estas petata diri unu frazon en nacia lingvo kaj en Esperanto).



Estas ankaŭ antaŭvidita ekskurso aŭtobusa al proksima historia urbeto Supraśl kun ĝia famekonata monaĥejo.

La programo certe ankoraŭ estos kompletigita per kelkaj interesaj aranĝoj, pri kiuj ankoraŭ daŭras intertraktadoj.

Por ebligi decan aranĝon bonvolu ĉiu jam nun

sciigi al LKK en Varsovio aŭ pli bone rekte al „Esperanto, Białystok. Poŝtkesto 120“ vian partoprenon en la pilgrimo. Naciaj kaj fakaj asocioj jam nun anoncu siajn delegitojn por salutparoladoj ĉe la megafonstacio kaj por ev. oficialaj akceptoj.

Venu al Zamenhofa naskurbo!

## KOMUNIKOJ DE LKK

### LA ALTA PROTEKTANTO DE LA KONGRESO.

Prezidanto de la Pola Respubliko prof. d-ro Ignacy Mościcki.

#### HONORA KOMITATO.

Prezidanto de Ministraro kaj Ministro de l'Interno generalo d-ro Felicjan Sławoj-Skłodkowski.

Vic-Prezidanto de Ministraro kaj Ministro de Financoj inĝ. Eugeniusz Kwiatkowski.

Ministro de Milito generalo Tadeusz Kasprzycki.

Ministro de l'Ekstero Józef Beck.

Ministro de l'Eduko profesoro Wojciech Świątosławski.

Ministro de l'Socia Prizorgo Marian Zyndram-Kościałkowski.

Ministro de Trafiko Juliusz Ulrych.

Ministro de l'Poŝto kaj Telegrafo inĝ. Emil Kaliński.

Vic-Ministro de la Trafiko inĝ. Aleksander Bobkowski.

Prezidanto de la Ĉefurbo Ministro Stefan Starzyński.

Registara Komisararo por Varsovio vojevodo Władysław Jaroszewicz.

Prezidanto de l'Banko de Landa Mastrumado (BGK) generalo Roman Górecki.

Prezidanto de l'Pola Poŝtsparkaso d-ro Henryk Gruber.

Prezidanto de Tutlanda Kuracista Ĉambro Ministro Witold Chodźko.

Vic-Komisaro de Varsovio vojevodo Kazimierz Jurgielewicz.

#### VIZOJ.

La provizora kongreskarto rajtigas ricevi senpagan vizon por eniri Polujon. (Minist. ordono: E. III 735/33/1 de la 6/7—37).

#### FERVOJA RABATO.

Ni jam komunikis al la esperantistaro pri la fervojaj rabatoj tra Polujo, Belgujo, Francujo kaj Ĉeĥoslovakio. Nun kun ĝojo ni povas informi pri la jenaj pluaj rabatoj:

**Aŭstrio** (Nr. 42663/1937 de 16/6) — 25% rabato en 3 kl. kaj 33% en la 2 kaj 1 kl. La rabato validos 3—15.8 al Varsovio kaj de Varsovio de 7—19.8 kontraŭ la provizora karto.

**Danujo** (Nr. II 17972 de 14/6) — grupoj de 20 pers. profitas rabaton.

**Finnlando** (Nr. 122/342 Tftk. us 15/6) grupoj de 12 pers. havas 25% rabaton.

**Italujo** (Nr. C. 312/19210/10 de 21/6) rabato 30%, al Varsovio de 28 de julio ĝis 14 de aŭg. de Varsovio de 8 aŭg. ĝis 25 de aŭg.

**Nederlando** (Nr. Ep. 4. G. 10/3328) grupoj de lo pers. profitas rabaton.

**Rumanujo** (33640, 16.VII.1937) individua 50% rabato returne kontraŭ la kongresa karto. La rabato validas de 7—20 de aŭgusto.

**Svedujo** (Nr. Ubr. 280/297 de 17 de junio) grupoj de 10 profitas de 25% rabato.

**Svisujo** (Nr. 2174.8011 de 18/6) individue 20%, grupoj de 6—14 pers. 20—30%, 15—99 pers. 30—40%.

Al ĉiuj kongresanoj ni jam sendis la fervojajn rabatilojn tra Polujo.



### AKCEPTEJO.

Akceptejo troviĝas ĉe str. Al. Jerozolimskie 39 kontraŭ ĉefa stacidomo. Ĝi funkcias de 7 h. matene. Dum la Solena Malfermo la akceptejo ne funkcias. Do, klopodu veni Varsovion kiel eble plej frue.

### SOLENA MALFERMO.

Solena Malfermo de la Kongreso okazos en salonego de Varsovia Filharmonio.

La naciaj grupoj estas petataj delegi plej bone parolantan samideanon por saluti la Kongreson. Ankaŭ ĉiu grupo delegu iun, plej bone en nacia kostumo, por la honora gardistaro. La naciajn flagojn ni havas.

### SOLENAJO SUR LA ZAMENHOFA TOMBO.

LKK memorigas al la samideanoj, ke laŭ la hebrea moro viroj sur tombejo devas porti ĉapeletojn.

Societoj kaj samideanoj dezirantaj mendi florkronojn aŭ florojn por meti sur la tombon de Zamenhof povos tion plenumi pere de LKK.

### TEATRA VESPERO.

Teatra vespero okazos en la varsovia operejo „Teatro Granda“ ĉe Teatra Placo. Oni prezentos unuaktan komedion de Al. Fredro „*Consilium Facultatis*“, verkita antaŭ cent jaroj, sed ĉiam aktuala kaj interesanta. Ĝi konsistigos la unuan parton de la vespero. En la dua vi vidos polajn popolajn dancojn, kiujn prezentos la dancistaro de Varsovia Opero, krome polajn ariojn kaj kantojn kiujn plenumos la plej bonaj kaj konataj geartistoj.

### LITERATURA VESPERO.

Literatura vespero estas aranĝata de „Literatura Mondo“ — Budapeŝto. La verkojn de niaj plej eminentaj poetoj kaj literaturistoj (do ankaŭ de si mem) prezentos bone al Vi konataj samideanoj: Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Ludoviko Totŝe, Jean Forge-Fethke, Francisko Szilaghyi, Sapiro, Lejzeroviĉ, Licsek, Bartha, f-ino Szelvenyi, f-ino Wirth kaj aliaj. Literaturaj Vesperoj jam havas sian famon kaj ne bezonas specialan reklamon. Ni povas esti tute certaj ke ankaŭ nune niaj literaturistoj kaj literaturuloj montros al ni belan kaj interesan spektaklon.

### BALO EN LA URBDOMO.

La Internacia Balo okazos en la reprezentaj salonoj de la Urbdomo.

Personoj alportantaj naciajn kostumojn estas petataj anonci tion al LKK. Ne forgesu tion fari en sia propra intereso.

### LITERATURA ENIGMO-KONKURSO DUM LA INTERNACIA BALO.

La partoprenantoj en la konkurso pretigu enigman bildon pri la titolo de iu verko, laŭplaĉe elek-

tita el la pola aŭ originala esperanto-literaturo, kaj tiun bildon, kvazaŭ emblemon ĉiu partoprenanto portu videble sur sia kostumo. La plej spritaj, plej trafaj enigmoj ricevos premion libran. Dekdu libropremioj estos. La premioj estos disdonataj de speciala komitato dum la Internacia Balo.

(Por plifaciligi la manieron de la konkurso ni priskribas du titolbildojn: 1) siluetoj de tri virinoj, mano montras al la tria. Jen la titolo de „SI LA TRIA“, verko de Sienkiewicz, 2) violoj inter sekaj folioj, jen la titolo de „PRINTEMPO EN LA AŬTUNO“, verko de Julio Baghy. Kompreneble oni devas enigmi nur la titolon kaj forlasi la nomon de la verkisto).

### BLINDULA KASO.

Post la Kongreso ni prezentos detalan raporton.

Koran dankon al s-ano direktoro Veljko Ramadanoviĉ el Zemun (Jugosl.), red. Harald Thilander el Stocksund (Sved.), s-ino Jacob el Thonon (Franc.) kaj ĉiuj aliaj kiuj, sendinte monoferon al Blindula Kaso, forte apogis nian laboron.

### RADIO DISAŬDIGOJ.

Inter kongresaj radio-disaŭdigoj certe interesa estos internacia koncerto de blindaj solistoj, prezentota de niaj kongresanoj - virtuozoj.

### FAKAJ KUNSIDOJ.

Anoncitaj estas novaj Fakaj Kunsidoj: de skoltoj, komercistoj kaj abstinenculoj.

### SOLENA FINO DE LA KURSOJ DE MORARIU.

La 7-an de junio en la salono de la Blindula Instituto okazis solena fino de la kursoj, gviditaj de s-ro Morariu. La solenaj partoprenis ĉ. 250 pers. inter kiuj estis multaj konataj esperantistoj. En la nomo de LKK parolis vicprezidanto s-ro L. Klimecki. En la nomo de lernantoj parolis s-roj Majewski kaj Mitnik. Post la oficiala parto okazis koncerto kaj komuna fotografado. Ĉiuj kursoj estis tre kontentaj pro la kursoj.

### BAGHY EN VARSOVIO.

Nia konata kaj ŝatata poeto Julio Baghy estas ankaŭ bonega Ĉe-instruisto. Pro la subita forveturo de s-ro T. Morariu, Varsovion venis Baghy, kiu gvidas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Ankaŭ estas komencitaj specialaj kursoj por tramvojistoj.

GRAVA!

URĜA!

AL ĈIUJ SOCIETOJ, REDAKCIOJ KAJ PRIVATAJ KOLEKTANTOJ.

La Ekspozicia Sekcio de L. K. K. turnas sin al ĉiuj societoj, redakcioj kaj privataj kolektantoj kun varma kaj urĝa peto pri alsendo de ekspoziciaj materialoj. La L. K. K. garantias



pri resendo de materialoj, kiuj dum la ekspozicio estos asekurataj.

Dezirataj estas, krom kutimaj ekspoziciaĵoj:

1. fotoj de esperantistoj — pioniroj en koncertaj landoj kaj fakoj,
2. unuaj lernolibroj (por ilustro de disvastigo de Esperanto),
3. plenaj listoj de nun ekzistantaj grupoj en koncertaj landoj,
4. listoj de urboj, en kiuj estas stratoj aŭ placoj nomitaj per nomo de Zamenhof, Esperanto, aŭ esperantistaj eminentuloj (se eble, kun fotoj de tiuj stratoj kaj placoj),
5. listoj kaj fotoj de Esperanto — aŭ Zamenhof — monumentoj kaj memortabuloj, kun fotoj,
6. ĉiaj materialoj pri praktika apliko de Esperanto en ĉiuj fakoj de vivo socia, ekonomia kaj kultura.
7. Ĉiaj materialoj historiaj, precipe el la unuaj tagoj de Esperanta movado en koncertaj landoj kaj en skalo internacia.

#### DUMKONGRESAJ PRELEGOJ.

Dum la Kongreso okazos diverstemaj prelegoj interplektitaj en la programo. Inter aliaj parolos:



Wilno. Preĝejo de S-ta Anna.

Fot. H. Poddębski.

S-ro I. H. Krestanov (Sofia) pri: „Bulgarujo—la lando de la rozoj kaj de la centjaruloj“,

S-ro J. Majór (Shanghai) pri: „La industria kaj komerca progreso de l' Ekstreoriento“,

S-ro V. Setälä (Helsinki) pri: „Figuraj esprimoj en Esperanto“,

S-ro J. Glück (Amersfoort) pri: „Zamenhof kiel filozofo kaj scienculo“ — kaj kelkaj aliaj.

Preskaŭ ĉiujn prelegojn akompanos lumbildoj aŭ filmo.

### LISTO DE KONGRESANOJ

- |  |   |
|--|---|
| 376. Wójcik Jan, ŝosea gardanto, Czechowska 38—2, Lublin, Polujo.  | 388. Kaciczak Tadeusz, komercisto, Kościelisko 374, Zakopane, Polujo.                   |
| 377. Jennen Antoinette, prezidantino de Brusela Grupo Esperantista, f-ino, 72 Rue d'Albanie, Bruxelles, Belgujo. | 389. Grodzki Marjan, optikisto, Chełmińska 5, Toruń, Polujo.                            |
| 378. Obozinski Simone, f-ino, 364 Avenue Brugmann, Uccle (apud Bruxelles), Belgujo.                              | 390. Chmielińska Janina, lernantino, Słowackiego 55, Toruń, Polujo.                     |
| 379. Toetenel Berthe, 6 Rue Thérésienne, Bruxelles, Belgujo.   | 391. Bendova Juliana, s-ino, Ĉeskobratska 8, Praha XI, Ĉeĥoslovakujo.                   |
| 380. Pięta Piotr, pastro, Łąka ĉe Rzeszów, Strażów (Lw), Polujo.   | 392. Doroszenko Vasył, instruisto, Wiśniowiec, skrzynka poczt. 20, Krzemieniec, Polujo. |
| 381. Zdebel Georgo, pentristo, 3-ego Maja 66, Nowa Wieś, Górny Śląsk, Polujo.                                    | 393. Houtsma O. E., d-ro, kuracisto, Plantsoen 19, Doetinchem, Nederlando.              |
| 382. Mróz Józef, tornisto, Miarki 25, Nowy Bytom, Polujo.  | 394. Houtsma M. J. A. Leyds, s-ino, Plantsoen 19, Doetinchem, Nederlando.               |
| 383. Burek Jan, tornisto, Równoległa 7, Nowa Wieś, Górny Śląsk, Polujo.  | 395. Migacz Józef, instruisto, Długosza 26/3, Nowy Sącz, Polujo.                        |
| 384. Lip Edward, Rawy 2, Świętochłowice, Górny Śląsk, Polujo.  | 396. Olsen Johanne, oficistino, f-ino, Lauritzskovsgade 15, Kopenhagen nord, Danujo.    |
| 385. Van Bellen Willem, emerita lernejo-direktoro, Larisclaan 41, Den Haag, Nederlando.                          | 397. Melchior Agnes, instruistino, f-ino, Blindeinstitutet, Kalundborg, Danujo.         |
| 386. Kermel Marie, s-ino, Nowy Bohumin 352, Ĉeĥoslovakujo.   | 398. Theodorsen Trygve, orgenisto, Bygdo allé 39, Oslo, Norvegujo.                      |
| 387. Yagi Hideo, d-ro, profesoro de la Okayama medicina fakultato, Kaminiŝlikaŭa 111, Okayama, Japanujo.         | 399. Karterud Halvdan, instruisto, Innherredsveien 129, Trondheim, Norvegujo.           |



400. Arnesen Alf., prezidanto de Norvega Blinduligo, Jessnes, Norvegujo.
401. Weyer T., f-ino, Diepesteeg 17, De Steeg, Nederlando.
402. Weyer L., f-ino, Diepesteeg 17, De Steeg, Nederlando.
